WORLD SCOUTING



# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

3-A JARKVARONO 1971

VOLUMO 4
NUMERO 11

# S ☆ E ☆ L

Fondinto: "Avoto"
Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:
"Avoto". Norman Booth.
D.H. Davis. L.J. Van Gulck

Prezidanto: John Berggreen,
Brattvollveien 23 c,
Nordstrandhøgda, Norvegujo

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxusstraat 7, Zaandam,
Nederlando.
Poŝtĝirkonto 63 22 46.

Kasisto kaj Administranto de
"La Skolta Mondo":
David H. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo,
Liverpool L 22 3YE, Britujo
Telefono WAT 2936

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,
Nergata 37 c, N-6500
Kristiansund N, Norvegujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.
Okaze de nericevo, bonvolu sciigi vian Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.


## 1 - 2 - 3

En via mano estas nun pli maldika numero de La Skola Mondo ol tiu, kiun vi kutime ricevas.

La kaŭzo de tio - aŭ la kaŭzoj - estas:
1. Manko de tempo. La redaktado eĉ de tiel malgranda revuo kia la nia, postulas sufiĉe da tempo. En tiu ĉi somero kaj aŭtuno mi havis pli ol ordinare multaj privataj kaj oficaj okupoj, kaj anstataŭ komenci la redaktadon je la deka de la dua monato de la kvaronjaro, mi ekredaktas en la mezo de lasta monato. Por eviti pli ol necezan prokraston, mi decidis limigi ĉifoje la gazeton al 8 paĝoj.

2. En kombino kun la unua punkto estas ankaŭ la dua: Manko de taŭga materialo. La redaktoro kompreneble ne povas, aŭ devas, mem verki ĉiun vorton en la revuo. Li dependas de la legantaro. Li ankaŭ ne povas aŭ devas uzi ĉion, kion li ricevas, sed devas elekti plejbonon por krei legindan gazeton.
Tiel vi, karaj gefratoj, respondecas.

Ankaŭ tria punkto gravas: Manko de mono.
Dum longa tempo la ekonomia stato de nia ligo estis malbona. Kvankam la lasta informo de la kasisto nun estas iom pli hela, ni ĉiuj devas konsideri, ke en malgranda ligo la bela revuo estas proporcie pli multekosta ol en granda ligo. La diferenco inter preskostoj de 7000 ekz. kaj 700 ne estas granda! Sed la enspezoj ne estas kompareblaj.

Ankaŭ al la financoj ĉiu membro de la ligo povas helpi: Ĉefe varbante aliajn geskoltojn.

Paranteze: En la jarlibro de UEA., paĝo 30, staras pri la organo de Tejo, Kontakto: "La sola internacia junulara revuo en Esperanto."
Ĉu prave?

Hans Amund.

## notu BE · NE

Kiel ĉiam Belgujo kiel unua sendis sian membroliston por la kuranta jaro. La sekcio kreskis

de 22 en 1970
al 38 en 1971.

Ni kore gratulas la sekcion!

Nederlando: La 7-an de decembro komenciĝos televida Esperantokurso en 20 lecionoj kun ankaŭ skoltaj aventuroj. Niaj amikoj nederlandaj kaj flandraj atentu mardvespere aŭ sabatmatene, kaj invitu geskoltojn al partopreno!

**BOY SCOUTS WORLD BUREAU** **BUREAU MONDIAL DU SCOUTISME**

MESSAGE OF DR: LASZLO NAGY TO THE 65th UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS

On behalf of the Boy Scouts World Conference representing over twelve million active members I have pleasure in sending cordial greetings to the opening of your Congress.

For many years a band of enthusiastic Esperantists who are also members of our Movement have maintained the Skolta Esperantista Ligo.

You will like to know that while your Congress is in session we are holding our 13th World Jamboree at Asigiri Heights in Japan when we expect to have 21,000 boys from all over the world camping together. The theme of the Jamboree will be "For Understanding" as typifying the fundamental objective of our Movement to improve understanding and goodwill among the youth of the world.

I trust you will have a successful and fruitful meeting.

**Laszlo Nagy.**

**Secretary-General**

MESAĜO DE D.RO LASZLO NAGY AL LA 65-a UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO

En la nomo de la knaboskolta monda konferenco, kiu reprezentas pli ol dek du milionoj membroj mi havas la plezuron sendi korajn salutojn al la malfermo de via kongreso.

Dum pluraj jaroj aro de fervoraj Esperantistoj kiuj ankaŭ estas membroj de nia Movado formis la Skoltan Esperantistan Ligon.

Vi ŝatos scii, ke dum via Kongreso kunsidas, ni havas nian 13-an Mondan Ĵamboreon ĉe la Asigiri-montoj en Japanujo kie ni atendas havi 21,000 knabojn el la tuta mondo en komuna kampo. La temo de la ĵamboreo estos "Por Kompreniĝo", kiel klarigo de la fundamento de nia movado, kreskigi la interkomprenon kaj bonvolon inter la junularo de la mondo.

Mi esperas, ke vi havos sukcesplenan kaj fruktodonan kunvenon.

Laszlo Nagy
Ĝenerala Sekretario

Supre troviĝas la teksto kaj traduko de la mesaĝo de Skolta Monda Konferenco al la Universala Kongreso.

Tiu eble estas la plej grava pruvo, ke nia laboro ne estas vana. Antaŭ nur kelkaj jaroj nia lingvo estis senrajta en la skoltismo, oficiale, kvankam BP mem rekomendas la lernadon.

Ni persistu en nia laboro, je beno de ambaŭ movadoj:

POR KOMPRENIĜO



# ĵamboreo

Du partoprenantoj de la norvega kontingento al la monda ĵamboreo trastudis la lernolibron de SEL

Nin kontaktis nederlanda skoltestro, kiu scipovis Esperanton, kaj li donis al ni nomojn ankaŭ de aliaj skoltoj en nia subkampo kiuj lernis la lingvon.

Oni provis aranĝi lunĉon en apuda urbo por la esperantoparolantaj skoltoj, sed ĝi bedaŭrinde ne okazis, ĉar ĉiuj skoltoj devis rifuĝi aliloken pro la vetero.

Anstataŭe oni aranĝis post la reveno al la kampo en la areo de la ĵamboreo kunvenon, al kiu la norvegaj skoltoj bedaŭrinde ne trovis tempon iri.

Terje Karterud

# kongreso

La 56-a Universala Kongreso estis tre grava por nia Ligo. Ne nur okazis nia tradicia membro-kunveno, sed ankaŭ valora renkonto kun kuratoro de Kapitala Fonduso, vizito al Skoltaj Centroj, kaj tre gravaj kunvenoj de membroj de la Centra Komitato kun la celo igi la administradon de nia Ligo plej eble facila kaj efika.

Inaŭguro.
Nia prezidanto unue transdonis al la kongreso salutojn de D-ro L. Nagy, la ĝen. sekretario de la Skolta Monda Oficejo.
Poste li transdonis salutojn de nia Ligo, alvokante, ke ĉiu kunlaboru por ke skoltoj lernu nian lingvon, kaj la movado tiel ricevu pli da junaj kaj aktivaj membroj.

Centra Komitato.
Speciale la kasisto kaj la sekretario plurfoje kunvenis por plani la administradon de SEL. Ni esperas plibonigi kontakton kun la membroj, aktivigi kelkajn naciajn sekciojn kaj simpligi la administracion, kiu daŭre kreskas pro niaj multaj aktivecoj kaj kreskanta membronombro.
Necesas, ke ĉiu N. R. plenumu siajn devojn. Malbona funkcio de nacia sekcio iafoje perdigis al SEL membrojn. Feliĉe la malfortaj lokoj estas maloftaj.

Financoj.
Nin vizitis D.H. Davis, kunfondinto de la Ligo kaj kuratoro de la du kapitaloj de la Ligo:
La Kapitala Fonduso, kaj
Paul Blaise Fonduso.
Li ĝojike komunikis, ke la kapitalo pro donacoj tiel kreskis, ke el la rentumo ni povos venki la nunan danĝeron kaj akcepti kelkajn senpagajn membrecojn el tiuj landoj, kie la transpago de kotizo donas problemojn.

Membro-kunveno.
Vendrede la 6-an de aŭgusto de la 10-a ĝis 12.45 en salono Hodler kunvenis 38 membroj kaj simpatiantoj el 14 landoj, inter ili Avoto (A.W.Thomson) kaj D.H. Davis.



N.R. Bardsley kaj Frederickx kaj Petersen salutis de la sekcioj, kaj la juna skolto M. Petermann de la SEL-grupo Neustadt en Germanujo.
Post silenta preĝo kaj enkonduka parolado la prezidanto donis la vorton al sekretaria

Raporto.

Nia Ligo regule, sed tre malrapide, kreskas. Finance sana vivo necesigas duobligon de la membronombro.
Nun multaj novaj membroj sin anoncas pro kursoj en la du antaŭaj jaroj. Nederlanda kaj norvega sekcioj triobliĝis.

Stranga fakto estas, ke la helpo en nia kampanjo venis de unuopuloj kaj nur malofte de kluboj aŭ landaj ligoj.

Japanujo: Malgraŭ la multaj afablaj vortoj kaj promesoj oni nur malmulte kunlaboris.
Ĉio dependas de la eltrovemo de niaj senlacaj japanaj amikoj, kiuj certe meritas aplaŭdon.
Ni aŭdis, ke la gazetoj raportis pri grandegaj pluvoj dum la ĵamboreo. Scivoleme nia Ligo atendos la raportojn el Japanujo.

Estonteco.

Ni vidas novajn eblecojn en rilato kun la Jaro de Internacia Amikeco de la eŭropaj skoltoj en kunlaboro kun neskoltaj junulaj asocioj 1972.
Antaŭ ol fari paŝojn rilate kun la venonta Monda Ĵamboreo en Jørstadmoen, Norvegujo, (1975) ni atendos la raportojn el Japanujo.

La estroj de la VII-a ĵamboreo en Essex jam promesis, ke nia lingvo ricevos lokon en la oficiala programo.

La LERNOLIBRO.

Se necese ni denove eldonos ĝin presita.
La sekr. klopodos akiri anoncojn por kovri parton de la kostoj. Por tio eldonkvanto de 10 000 estos necesa.
Tio signifas, ke ni bezonos antaŭmendojn, ne nur por pagi la reston, sed precipe ĉar mankas loko por tiom en la domo de la sekr

Nomo de la Ligo.

Longe, eble tro longe, oni diskutis la nomon de la Ligo. Tradiciemaj membroj malemas al ŝanĝo, dum aliaj deziras pli mallongan kaj modernan nomon. Kelkaj timas konfuzon kun aliaj -istoj, spiritistoj, komunistoj ktp, kio fakte jam kelkfoje okazis.
Malavantaĝo estas necesaj ŝanĝoj ĉe bankoj, poŝto, leterpapero jam presita ktp.
Bardsley diris, ke "rozo ĉiam estas rozo, kia ajn estas ĝia nomo."
19 voĉis por ŝanĝo, 6 kontraŭ. Oni proponas 'Skolta Esperanto-Ligo', S.E.L.
Laŭ la Statutoj ni nun lasas la decidon al la membroj, kiuj ensendu sian opinion.

Informado.

Tiel longe, kiel ekzistas skoltoj, kiuj ne aŭdis pri ni, ni daŭrigu niajn klopodojn.
Ni persistu!
Eĉ se la laboro ne donas tujajn fruktojn, oni plugas la teron.

Protokollibro.

Avoto transdonis al CK la retrovitan unuan protokollibron el la jaro 1920.

Donaco.

Tuj post la fermo de la kunveno CK ricevis tre grandan sumon por la unuaj kostoj de nova eldono de la lernolibro.

Vizitoj.

Membroj de la Ligo vizitis dum la UK:
Roland House, Skolta Centro en la laborista kvartalo Stepney Green, B.P.House, Gilwell Park, kun muzeo pri skoltada historio.
CK penos krei memorigilon pri SEL tie.

En la belga skolta gazeto "TELE". jam dum kelkaj monatoj aperas kurso pri la internacia lingvo.

En la rubriko kun opinioj de la legantoj, multaj el la leteroj laŭdis tion.

Kompare al la reagoj en la antaŭaj jaroj, ni klare povas konstati, ke la skoltaro nun pli bone komprenas la signifon de nia lingvo.

Kion ni povas fari?
Ni povas peti ĉe la belga gazeto korespond-anoncon, kun iniko, ke ni deziras uzon de Esperanto dum nia kontakto "For Understanding", por kompreniĝi.

Tutsame ni povas, kiam ni trovas korespondanoncon en La Skolta Mondo, ĉiam transsendi ĝin al nia nacia skoltgazeto, kaj tiel montri la utilon de nia lingvo.

CENTRA KOMITATO informas:
Ek de la jaro 1972 la ekzempleroj de LSM al membroj en landoj kun NR nur estos sendataj pere de li.
Se estas kaŭzo por plendi pro nericevo, bonvolu averti la administranton.

## Laste aperis. . .

Secondary School Esperanto, II, de R.H.M. Markarian kaj J.H. Sullivan

Ne estas facile diri ion pri iu lernolibro, kiun oni mem ne uzis dum kelka tempo.
Sed mi foliumis, mi legis, kaj mi komparis kun la lernolibroj ekz. en angla lingvo, kiujn miaj infanoj uzas en la deviga instruo en la oficiala lernejo.

Estas multaj trajtoj, kiuj estas similaj. Estas aliaj, kiuj nur atestas pri la fakto, ke Esperanto estas la pli facila lingvo.

Vere, mi emus traduki tiun ĉi libron kaj proponi ĝin por niaj lernejaj aŭtoritatoj, kun espero ke ili povas ĝin aprobi.

Ĝi aperas ne kiel amatora verko sed kiel libro por uzo en lernejoj. Ni bezonas tiajn.

Gratulon al la aŭtoroj - kaj al la eldonejo University Tutorial Press LTD.
La prezo de la libro estas £1.00
Kopirajto ĉe la aŭtoroj.

Adoru Kantante Evangelia Himnaro.

Dum Esperantokunvenoj kaj Kongresoj ofte ankaŭ estas edifoj aŭ diservoj. Tial oni frue spertis bezonon ne nur de kantolibroj en kiuj estis du-tri religiaj kantoj, sed ankaŭ de himnaroj.
Pluraj aperis - inter tiuj du, Himnaro Esperanta en Britujo, kaj Evangelia Kantaro en Svedujo, pli elstaris.
Sed la movado bezonis unuecon, - paralela uzo ne estis ebla, uzo de ambaŭ samtempe nepraktika.
KELI do nomis komitaton por prilabori novan, komunan himnaron.

En la intertempo nia redaktoro eldonis la libron "Cent Himnoj", kaj pro tio ankaŭ li elektiĝis membro de la komitato.

La rezulto de plurjara laboro nun aperis en plaĉa libro kun muziko (kvarvoĉa notaro) al ĉiu himno. La internacieco klare montriĝas, ĉar la himnoj estas prezentataj sub sia origina nomo.
Bonvenon!

Naciaj reprezentantoj:

| | |
|---|---|
| Aŭstralio: | S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, 3127 Victoria. Telefono WF 7948. |
| Belgujo: | S-ro Eddy Frederickx, Paasbloemstraat 31, B-2060 Merksem-Antwerpen. Poŝtĉekk. 9978.93. Tel. (03)4524.76.<br>L.J. van Gulck: telefono 03-3688.08.<br>Poŝtkonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460. |
| Brazilio: | S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para. |
| Britujo: | S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs. |
| Danlando: | S-ro Asger Petersen, Blistrupsvej 8, DK-2610 Rødovre. Telefono 707157. |
| Finnlando: | S-ro Seppo Tella, 9 kp, SF-55950 Imatra 95. Telefono 954-51130. |
| Francujo: | Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76 Rue Lombard, Bordeaux |
| Hispanujo: | S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Telefono 25 20 44. |
| Italujo: | Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198. |
| Japanujo: | S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka. |
| Kanado: | S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..<br>Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb. |
| Kongo: | S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P. 198, Limete, Kinshasa. |
| Nederlando: | S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Telefono (02980)-66931. Poŝtkonto 63 22 46. |
| Norvegujo: | S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 Kristiansund N. Tel (073)-77620. Poŝtkonto 8 03 04 13. |
| Portugalujo: | S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3°Dt°, Lisboa I |
| Usono: | S-ro H. William Beare, 1007 Chicago Blvd., San Antonio, Texas 8 15 39. |


Informoj pri membreco.

*<u>En landoj kun Nacia Sekcio</u>:
Informiĝu ĉe la N.R. kaj pagu al li la landan kotizon.
<u>Individuaj membroj</u>: (Nur en landoj sen N.R. !)
Kotizo inkl.abono de LSK por junuloj ĝis 18 jaraj:
Angla £ 0.40 (Ned.guldenoj 3.30)
Por pli-aĝuloj: £ 0.60 (Ned.guldenoj 5.00)
Subtenantoj : Minimume £ 0.60 aŭ Ned.g. 5.00
Oni pagu al la kasisto, aŭ se necese al la sekretario.

Ĉiam bonvolu pagi vian kotizon antaŭ la unua de aprilo !

SKOLTA
E L

"ESTU PRETA"




Interŝanĝo de spertoj.
Babilado inter Hermann Behrmann, aŭtoro de Esperanto programita, kaj J.K. Hammer, dum la kongreso en Londono.





**La Skolta Mondo**

Memoru la limtempon.
La datoj estas 1-a de Februaro, 1-a de Majo, 1-a de Augusto kaj 1-a de Novembro.

---

**REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND**


Biblioteka Uniwersytecka KUL